

MEMORANDO
pri la aŭtonomio de la hungaroj
vivantaj en Respubliko Serbio

Preparis

d-ro Sándor Hódi

surbaze de internaciaj dokumentoj pri naciminoritata memdecido kaj de la propono de la eksperta komisiono.

Membroj de la komisiono: d-ro Mihály Ágoston, Antal Bálint, Lajos Balla, d-ro Éva Hódi, d-ro Sándor Hódi, Mr. Endre Huszágh, János Jasztrebinác, Tivadar Kongó, Zoltán Lévai, Károly Lukity, Magistro Károly Mirnics, János Vékás kaj Imre Vörös

Laŭ la pritakso de la Demokratia Asocio de la Hungaroj en Vojvodino la aktualaj debatoj, koncerne la ŝanĝojn en la estinta Jugoslavio kaj koncerne la nesolvitajn problemojn, neprigas koncepti programe niajn imagojn pri la estonteco de la hungaroj, restintaj en la Respubliko Serbio, kaj projekti niajn starpunktojn pri la aŭtonomio.

Flanke de la Prezidentaro de la Demokratia Asocio de la Hungaroj en Vojvodino la ekspertiza komisiono, taskigita por tiu laboro, preparis la bazajn dokumentojn pri la memadministrado de la hungaroj, kiujn ĝi prezentas al la ĝenerala Kunveno por debati, proponante tiusence la akcepton de la aldonitaj decidoj.

En la senco de la artikoloj 2. kaj 81. de la Konstitucio de Respubliko Serbio la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino je la nomo de 100 000 civitanoj, subskribintaj la iniciaton, turnas sin al la Parlamento de Serbio postulante

OKAZIGI REFERENDUMON

por difini la statuson de la Aŭtonoma Provinco Vojvodino:

1. Sekve, ke laŭ la artikolo 2. de la Konstitucio la civitanoj povas decidi pri sia suvereneco per referendumo, la subskribintoj de la postulo en la senco de la artikolo 81. de la konstitucio taskigas la parlamenton de Serbio anonci referendumon.

2. Per la referendumo la civitanoj de la Aŭtonoma Provinco Vojvodino, kiuj havis la 1-an de januaro 1989, konstantan loĝejon sur ĝia teritorio, devas esprimi sian opinion pri la jenaj starigitaj demandoj:

(Alternativa propono)

En la referendumo povas esprimi sian opinion ĉiu civitano, respektive ties ido, kiu post la fino de la unua mondmilito havis konstantan loĝejon sur la teritorio de la nuna Vojvodino kaj ĉiuj civitanoj, kiuj la 1-an de januaro 1989 posedis konstantan loĝejon sur la teritorio de la Aŭtonoma Provinco Vojevodino.

3. La daton de la referendumo fiksas la Parlamento de Respubliko Serbio.

4. Per la referendumo oni devas respondi al la demandoj:

a) *Mi apogas, ke la Aŭtonoma Provinco Vojvodino estu konstituita kiel memstara politika kaj ekonomia subjekto.*

b) *Mi apogas, ke Vojvodino estu organizita laŭ la Konstitucio de Respubliko Serbio, proklamita la 28-an de septembro 1990.*

La respondo okazas per cirkleto desegnata ĉirkaŭ la litero antaŭ unu el la eblaj solvoj, aŭ alimaniere, sed estu unusence videble, por kiu varianto voĉdonis la civitano.

5. En la kazo, se pli ol 50% de la civitanoj apogas la eblon sub la punkto a), maksimume 30 tagojn post la referendumo oni devas per de-

mokratiaj balotoj starigi Konstituciigan de Vojvodino, kiu dum sia unua kunsido akceptos la Konstitucion, proponitan en konsento inter la legitimaj kaj legalaj politikaj organizaĵoj, agantaj sur la teritorio de la provinco, poste sur ties bazo anoncas ĝeneralajn balotojn sur la teritorio de Vojvodino.

6. La Konstitucio de Respubliko Serbio devos esti modifita laŭ la rezulto de la referendumo kaj laŭ la provinca Konstitucio, akceptita de la Konstituciiga Asembleo de la Aŭtonoma Provinco Vojvodino.

7. En la intereso de la okazigo de la referendumo devas esti garantiata inspekto kaj kontrolo flanke de la internacia komunumo kaj por la interesemaj eksteraj landoj.

PROPONO

La jarkunveno de la DAHV debatis la projekton preparitan de la Ekspertiza Komisiono kaj akceptas la sekvantajn

DECIDOJN

1. En la senco de la ordiga propono, prezentita de lordo Carrington al la Jugoslavio-konferenco en Hago, por aranĝi la statuson de la hungara etnogrupo vivanta en Serbio, en Vojvodino estas necese:

- a) sekurigi politikan subjektivecon al la hungara etnogrupo,
- b) garantii eblon, ke la ĉi tie vivantaj hungaroj starigu
 - aŭtonomion sur persona principo,
 - teritorian aŭtonomion, fonditan per asociiĝo de komunumoj kun speciala statuso,
 - lokajn aŭtonomiojn de la hungaroj, vivantaj en sporadaj vilaĝoj kaj vilaĝgrupoj.

2. Devas esti ebligita al la civitanoj de Vojvodino decidi referendume pri la ŝtatjura statuso de la regiono, posedanta historian, geografian, kulturen kaj ceterajn tradiciojn.

3. La hungaroj en Vojvodino deziras akiri sian aŭtonomion kune kun la tie vivantaj aliaj popoloj kaj etnogrupoj.

4. Ĉi tiuj decidoj devas esti ekspedataj al la brusela konferenco, funkcia kiel daŭrigo de la Jugoslavio-konferenco en Hago.

Magyarokanizsa (Kanjža), 1992. apr. 25.

András Ágoston
la prezidanto de DAHV

AMENDA PROPONO AL LA KONSTITUCIO

Laŭ la dokumentprojekto por la konferenco pri Jugoslavio kaj en la senco de la artikolo 132. de la Konstitucio de Respubliko Serbio la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino je la nomo de 50 subskribantaj parlamentoj (alternativo: 100 000 civitanoj) prezentas

PROPONON POR AMENDAĴOJ AL LA KONSTITUCIO en la Parlamento de Respubliko Serbio

I. amendo ĉapitro 1.

Post la artikolo 117. de la Konstitucio nova subtitolo: **Komunumoj kun speciala statuso**, sekvu nova (117. a) artikolo laŭ la jena teksto:

Komunumoj, kie iu etno vivas en simpla plimulto, ĝuas specialan statuson.

La pozicion de la komunumoj kun speciala statuso reguligas aparta leĝo.

ĉapitro 2.

Post la artikolo 117.a nova subtitolo: **Etnaj teritoriaj aŭtonomioj**, poste sekvas nova (117 b.) artikolo kun la teksto:

Pluraj najbaraj komunumoj kun speciala statuso kuniĝante povas fondi teritorian aŭtonomion de la tie vivanta etna plimulto.

La procezon kaj formon de la etna teritoria aŭtonomio, ĝian kompetentecon por ĉiu opa etno reguligas aparta leĝo.

II. amendo ĉapitro 3.

Post la artikolo 117. b) nova subtitolo: **Lokaj etnaj aŭtonomioj** (lokaj aŭtonomioj), poste nova (117. c) artikolo laŭ la teksto:

En vilaĝoj, kie sporade vivas anoj de iu etno en simpla plimulto, ili povas formi lokan etnan aŭtonomion (aŭtonomiojn).

La funkciadon de lokaj etnaj aŭtonomioj reguligas aparta leĝo.

III. amendo

ĉapitro 4.

Post la artikolo 118. nova ĉeftitolo: VI. a) **Etna aŭtonomio bazita sur persona principo** (minoritata aŭtonomio), post tio nova (118. a) artikolo sekvas laŭ la suba teksto:

Etnoj vivantaj sur la teritorio de la Respubliko – se ili esprimas tian postulon – povas esti politikaj subjektoj.

Tiuj etnoj povas establi etnan aŭtonomion bazitan sur persona principo. En la kadro de tiu aŭtonomio bazita sur persona principo per siaj leĝoj reguligas la edukan, kulturen kaj informan agadojn, surbaze de konsento kun la plej altrangaj ŝtataj potencorganoj ellaboras kodeksojn pri lingvouzo.

La etnan aŭtonomion sur persona principo reguligas aparta leĝo.

ĉapitro 5.

Ĉi tiuj amendoj al la Konstitucio kaj la konstitucia leĝo pri ilia plenumo validas ek de ilia publikigo.

INICIATO

por establi aŭtonomion de la hungaroj vivantaj en la Respubliko Serbio

Laŭ sia Konstitucio Respubliko Serbio estas demokratia ŝtato de la civitanoj vivantaj en ĝi, bazita sur la principo de suvereneco de la civitanoj,

konsiderante, ke la plifortigo kaj protekto de la minoritata (etna) aŭtonomio estas grava kontribuo al la establo de Eŭropo, bazita sur la principoj de demokratio kaj potenc-decentrigo, krome diversaj formoj de aŭtonomio garantias plej altnivele disvolviĝon de etnaj specifecoj kaj konservadon de etna kaj lingva identecoj,

respektante la streĉojn de la internacia komunumo, precipe de la Eŭropa Komunumo kaj de la Jugoslavio-konferenco en Hago kaj en Bruse-lo, la tie entreprenitojn por solvi la problemojn kiuj ekestis per la disfalo de Jugoslavio kaj per formiĝo de novaj ŝtatoj,

akceptante la proponon de la prezidanto de la Jugoslavio-konferenco por normaligi la statuson de naciaj minoritatoj (etnoj) kaj celante ĝian efektivigon,

fidante, ke Respubliko Serbio surbaze de la menciitaj principoj deziras esti malfermita, moderna, demokratia membro en la komunumo de eŭropaj landoj; ke ĝi akceptas la celadojn de la Eŭropa Konsilio, la klopodojn de UN, ke ĝi ĉion entreprenos inter demokratiaj cirkonstancoj de la nuntempa internacia komumumo plej altnivele protekti kaj sekurigi la firmiĝon de la homaj kaj minoritataj (etnaj) rajtoj,

la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino opinias, ke estiĝis kondiĉoj kaj ekzistas realaj bezonoj formi publikleĝajn kadrojn por esprimi kolektivajn interesojn de la hungaroj vivantaj sur la teritorio de Respubliko Serbio, eksplicite al la establo de

1. persona aŭtonomio,
2. hungara teritoria aŭtonomio kun speciala statuso kaj
3. hungaraj lokaj aŭtonomioj.

Per la apliko de la supraj formoj de aŭtonomio ekestus kondiĉoj por demokratia esprimo de politika subjektiveco de la hungaroj vivantaj ĉi tie, ne ĝenante la suverenecon kaj interesojn de la plurnacia Respubliko Serbio. La ĉeesto de la proponataj institucioj en la politika sistemo estus samtempe faktoro por la plua demokratigo, por la humanaj interrilatoj kaj konfideco de la plurnacia ŝtato, Respubliko Serbio, en la internaciaj rilatoj.

Surbaze de la supre menciitaj, la Konferenco de la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino subtenis la bazan dokumenton, kiu koncernas memdecidon de la hungaroj kaj prezentas ĝin al la parlamento de Respubliko Serbio, kiel konstitucian amendaĵon por aprobi.

PERSONA AŬTONOMIO

ĝeneralaj dispozicioj

paragrafo 1.

Konkorde kun la finaj dokumentoj de la postkonferencoj en Helsinki, Madrido kaj Vieno, kun la decidoj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo por rajtoj al libereco, kun la pariza dokumento pri nova Eŭropo, kun la deklaro de la ĝeneva ekspertiza komisiono pri naciaj minoritatoj kaj kun la proponoj de la Jugoslavio-konferenco en Hago ni esprimas:

1. La etnaj minoritatoj kaj etnoj estas gravaj komponantoj de la politika kaj kultura pluralismoj en la socio.
2. La etnaj minoritatoj kaj etnoj estas parto de la popola potenco kaj ili estas ŝtatkreanta faktoro en sia patrujo.
3. Ĉiuj minoritatoj kaj etnoj havas respektendan kaj nekontesteban rajton defendi sian identecon kaj uzi siajn rajtojn kaj atingi siajn celojn.
5. La amikeco inter la popoloj, la paco, stabiliĝo kaj la demokratio postulas, ke la majoritata popolo garantiu kaj protektu la etnan, kulturan, lingvan kaj religian identecon de la minoritato, kion argumentas

apud la humanaj kaj politikaj principoj partopreno de la minoritatoj (etnoj) en la ĝeneralaj ekonomiaj procezoj.

Kolektivaj rajtoj

paragrafo 2.

Aparteni al persona aŭtonomio, respektive al nacia, etna aŭ lingva komunumo estas nefremdigebla, nekontestebla fundamenta rajto, bazita sur libera volo de la homoj.

paragrafo 3.

Civitanoj kaj etnĵ apartenantaj al minoritataj komunumoj rajtas posedi aŭtonomion por direkti sendepende siajn aferojn.

paragrafo 4.

Pri la aferoj el la agosfero de aŭtonomio, precipe en la kampoj de kulturo, informado kaj lingvouzo, do por plenumi ĉiujn bezonatajn taskojn, difini la posedatajn rajtojn, la etnoj devas disponi ankaŭ pri leĝofaraj rajtoj.

paragrafo 5.

La kompetenteco de la persona aŭtonomio, formita por eduko, kulturo, informado kaj lingvouzo estas limigebla fronte al siaj institucioj nur rekte per la konstitucio.

paragrafo 6.

La ŝtato liveras financojn al la persona aŭtonomio rekte el la buĝeto kaj konfidante certajn aliajn profitfontojn al ĝi. Edukaj, kulturaj kaj informaj institucioj, kiuj origine, antaŭ la ŝtata konfiskado estis havaĵo de

minoritataj organizaĵoj, ek de la fondiĝo de la persona aŭtonomio re-propriĝos al la aŭtonomio, konservante sian civiljuran statuson. Se ie ne eblas restarigi la pli fruan naturan situacion, la ŝtato adekvate kompensas al la estiĝanta persona aŭtonomio surbaze de la jurkontinuo, certigante la ebl + on formi novajn instituciojn kapablajn funkcii konvene al la celadoj.

paragrafo 7.

La elektita gvidorgano de la persona aŭtonomio akceptas la organizan statuton kaj aliajn dokumentojn de la aŭtonomio.

paragrafo 8.

Balotoj por la gvidorgano de la persona aŭtonomio okazas per ĝenerala, egala, senpera kaj sekreta voĉdonado. La balotojn – samtempe kun tiuj por la lokaj magistratoj – partoprenas personoj, kiuj posedas voĉdonrajton kaj apartenas al la minoritata socio. Kiel elektitaj estas traktataj tiuj personoj, kiuj akiras la plej grandan nombron de la voĉoj.

paragrafo 9.

La organizan statuton de la aŭtonomio, respektive ĝian proponon aprobas la parlamento kaj garantias la konstitucio.

paragrafo 10.

La kompetenteco de la parlamento estas limigita strikte al la konstitucia revizio de la organiza statuto.

Persona aŭtonomio

paragrafo 11.

Celadoj de la aŭtonomio:

1. emancipigo kaj protekto de la nacia, etna kaj lingva identecoj, de la informigaj kaj lingvouzaj rajtoj,
2. prizorgo, evoluigo kaj plifortigo de la historiaj tradicioj, materia kaj spirita kulturoj de la hungara etno.

paragrafo 13.

La persona aŭtonomio ĝuas juran personecon kiel publika kolektivo, kiu en la agosfero fiksita de la Konstitucio kaj la organiza statuto, estas suverena pri la potenco koncesiita al ĝi kaj ĝi kvalifikite plenumas sian agadon sen ajna influo de la ŝtato.

paragrafo 13.

Al la persona aŭtonomio apartenas ĉiu institucio kaj persono, kiu esprimas sian volon, agadi en la persona aŭtonomio, kaj kies registriĝo okazas surbaze de deklaro. Krome ankaŭ tiuj institucioj kaj organizaĵoj, kiujn fondas la aŭtonomio mem.

paragrafo 14.

La elektita gvidorgano de la persona aŭtonomio povas registri ankaŭ personojn, kiuj ne apartenas al la hungara nacia, lingva minoritato, kiuj pro sia eduka, religia kaj kultura bazoj, intereseĉemo aŭ alia kialo deziras engaĝiĝi en la laboro de la hungara aŭtonomio kaj kontribui al ĝia materiala bazo.

paragrafo 15.

La elektita gvidorgano de la persona aŭtonomio deklaras konkurson disponigi rimedojn por difinita celo el la buĝeto. Leĝan kontrolon de

destinita uzo de tiuj rimedoj starigas kompetenta organo de la liverinto de tiuj rimedoj.

paragrafo 16.

La aŭtonomio laŭ sia pritrakto povas partopreni en negoco, kiu kontribuas al la plibonigo de la financa stato, ĝi povas preni krediton kaj eldoni obligacion.

La organoj de la persona aŭtonomio

paragrafo 17.

La organoj de la persona aŭtonomio estas:

1. La parlamento de la hungara etno,
2. la konsilantaro de la aŭtonomio,
3. la prezidanto de la aŭtonomio.

paragrafo 18.

La parlamento de la hungara etno konsistas el deputitoj, elektitaj de la balotintaj civitanoj, kiuj apartenas al la hungaroj kaj al la asociintaj aliaj naciaj, lingvaj, religiaj kaj etnaj minoritatoj. La mandato de la deputitoj daŭras kvar jarojn.

paragrafo 19.

La parlamento de la hungara etno estas la plej altnivela organo de la persona aŭtonomio, kiu

- proklamas statuton de la aŭtonomio
- proponas leĝojn pri eduko, kulturo kaj informado,

- surbaze de konsento kun la plej alta organo akceptas kodeksojn pri la firmigo de rajtoj al lingvo- kaj skribouzo de la hungara etno en la medioj, kie ne estas praktikebla en la kadro de teritoria aŭtonomio,
- reguligas kun la ŝtataj instancoj, kun la patrino lando kaj kun la internaciaj subjektoj ligitajn interrilatojn kaj kunagadon,
- elektas la aŭtonomian konsilantaron, la prezidanton de la aŭtonomio kaj la komisionojn de la parlamento,
- akceptas regularon pri la agado de la organoj de la aŭtonomio,
- kreas aliajn leĝ regulojn kaj opajn aktojn en la kadro de sia kompetenteco.

paragrafo 20.

La konsilantaro de la aŭtonomio estas operativa kaj decidofara organo de la persona aŭtonomio. Ĝi nombras 30 membrojn. Proponojn pri la membroj de la konsilantaro prezentas la parlamento el la vicoj de la elektitaj deputitoj de la aŭtonomio.

paragrafo 21.

La konsilantaro aŭ faka komisiono nomumita de ĝi

- elaboras la statuton de la persona aŭtonomio, kiun prezentas al la konferenco - al la parlamento de la hungara etno,
- donas proponojn por fondi hungarajn instituciojn, reorganizi ilin kaj por ilia funkciado en la kampo de eduko ek de infanĝardeno ĝis ĉiuj postulataj universitataj fakoj.
- kontrolas la funkciadon de la edukaj, kulturaj, informaj lingvaj kaj ceteraj institucioj apartenantaj al la persona aŭtonomio,
- garantias liberan informadon, esprimantan la interesojn de la hungara komunumo,
- en la okazo de malrespekto de la rajtoj de minoritataj personoj, grupoj, organizaĵoj intervenas ĉe la ŝtatorganoj se la afero ne apartenas sub juĝa kompetenteco,
- zorgas pri komunaj konstruaĵoj, loĝ ejoj, valorpapiroj, monrimedoj, movaĵoj kaj havaĵoj en la posedo de la persona aŭtonomio.

paragrafo 22.

La prezidanton de la aŭtonomio elektas la parlamento el pluraj kandidatoj. La mandato de la prezidanto estas 4 jara.

paragrafo 23.

La prezidanto de la aŭtonomio

- zorgas pri plenumado de leĝoj, dekretoj, ordonoj kaj intervenoj de la aŭtonomio,
- reprezentas la interesojn de la persona aŭtonomio,
- nomummas funkciulojn de la aŭtonomio, kiujn oni ne elektas,
- plenumas ĉiujn taskojn, kiujn la leĝo aŭ la statuto donas en lian kompetentecon,
- la prezidanto de la aŭtonomio antaŭ enoficiĝo ĵuras en la parlamento. La ĵurtekston kaj la formon de la prirespondeco de la prezidanto preskribas la statuto de la aŭtonomio.

ARGUMENTOJ

al la propono pri la persona aŭtonomio

Ekirante el la konstato, ke la rajto de civitanoj senpere partopreni en la solvo de la komunaj aferoj estas unu el la fundamentaj principoj de demokratigo, ke civilaj grupoj kaj organizaĵoj, kiuj prenas sub sian direktadon certajn taskojn, apartenintajn tradicie al ŝtata respondeco, firmigas socian pluralismon kontraŭ la homogeniga tendenco: DAHV per sia aktia rolo lukta por kontentiga aranĝo de la statuso de la hungaroj en Respubliko Serbio.

Demokratia ŝtato devas sin konstrui paralele sur postuloj al la liberecoj de la individuo, la minoritataj etnoj kaj de la nacia komunumo. La minoritatoj travivas sian liberecon depende de la efektiviĝo de memdecidaj rajtoj. Libereco de la popolo naciopinie ne estas certigita, se oni ne

garantias ĝian protektadon al la minoritataj grupoj. Nur sekurigo de la kolektivaj rajtoj signifas realan eblecon al la minoritatoj por esprimi sian volon, sian liberecon.

El la kolektivaj minoritataj (etnaj) rajtoj la plej grava estas tiu, kiu garantias la memdecidon. La institucio de aŭtonomio – depende de la potenco allasita de la ŝtato – povas efike helpi la konservigon de la naciminoritataj, etnaj grupoj, de ties valoroj kaj identecoj. El la minoritataj etnaj kolektivaj rajtoj la aŭtonomio samtempe ebligas solvi la naciajn antagonismojn, firmigi la stabiligon de la regiono kaj la integriĝon en Eŭropon.

En la 19. jarcento aperis kiel regulo la principo de nacia, naciŝtata suvereneco, kion post la disfalo de la orient- kaj mezeŭropaj diktaturoj farbas sur siajn standardojn novaj naciaj ŝtatoj, luktante por sendependeco. Tia sinteno ne kapablas solvi la naciajn kontraŭdirojn kaj la problemojn de la minoritatoj. Klare videblan ekzemplon montras al ni ĉio okazanta en la estinta Jugoslavio.

La nunan nacian koncepton, kiu malgraŭ la oficiale deklarata egalrajteco taksas la minoritatojn duarangaj civitanoj, ankaŭ Serbio ne povas jam longe teni. En la pasinta periodo Serbio provis realigi tiun netolereblan principon, utopion. Ĝi jam spertis, laŭ kiu prezo ĝi devis pagi tion.

La solvon, la estonton, la ireblan vojon ofertas politiko, kiu samtempe apogas sin sur la sopiroj de la minoritataj kolektivoj al libereco kaj sur tiu de la nacia komunumo. Tia politiko, kiu ne strebas fermi la volon de la tuta popolo en homogena politika kadro, kaj kiu ne iluziigas sin per tio, ke nacia identeco estas esprimebla kaj konservebla ekskluzive en la formo de memstara ŝtateco.

En ĉi tiu etne bunta regiono estas neneglektenda postulo de la praktika vivo diversaj politikaj kadroj – ŝtato, regiono, minoritata (etna) aŭtonomio, respektive memdecido – ties akordigo kaj paralela ĉeesto.

Inter la postulo al libereco de la minoritata kolektivo kaj tiu de la nacia kolektivo ne rimarkeblas diferenco. Escepte se oni vekas problemon pri stabiligo de la regiono. Tia koncepto pri nacio, kiun karakterizas netoleremo etna, kiu spitas validigi aŭtonomiajn principojn, kaj kiu la

nacion klopodas premi persiste inter la limojn de unika lando, tiu vane deklaras rajtojn, la naciminoritatajn problemojn tamen ne solvas, sed viŝas ilin el la listo de la solvendaj problemoj. Konante la situacion en Jugoslavio estas superflue pruvadi la konsekvencojn, kiujn tio kunportas.

Sen racia dialogo de samrangaj partneroj estas neimageble traponti la krizojn kaj stabiligi la regionon. La hungara etno de Vojvodino jam antaŭ longe atingis nivelon de politika konscio, kiu ĝin kapabligas al dialogo. Konforme kun tio DAHV havas la plej gravan politikan klopodon, ke la hungaroj, kiuj vivas ĉi tie, akiru legitimecon de siaj rajtoj, ke establinte aŭtonomion sur persona principo la konstitucio fiksas partneran interrilaton kun la serba popolo.

Por ke ekestu normalaj partneraj rilatoj, por ke formiĝu racia dialogo, la direktantaj rondoj en la serba politika vivo devas rezigni pri la ekskludema interpreto de la doktrino pri nacia suvereneco. Pri tio, ke la ŝtato reprezentas la suverenecon nur de la majoritata popolo, ke sekve de tio ĉiun plendon por memdecido el la direkto de aliaj nacioj kaj minoritatoj ĝi perceptas kiel atencon kontraŭ sia nacia suvereneco. Tiu netoleremo malebligas al la nombre malpli multaj minoritatoj la memdecidon, ĉar ĝi elpaŝas kontraŭminace ĉiuj tiaj postuloj. Pro la minaco, pro la reprezalioj la malpli nombraj devintiĝas limigi sian sopiron al libereco, strebojn al emancipiĝo: ili devas akcepti, ke ili estas duarangaj civitanoj fronte al la majoritata popolo.

Ni estas profunde konvinkitaj, ke demokratia Serbio devas stari sur tiaj fundamentaj principoj, kiuj ankaŭ al la malpli multaj ebligas en laŭleĝaj kadroj mem decidi pri tio, kian statuson ili deziras, kiel ili kapablas plej bone konservi kaj flegi siajn lingvan kulturon kaj nacian identecon.

Sekve, ke la Respubliko Serbio havas intereson aranĝi la politikan statuson de la minoritatoj (etnoj), ni fidas, ke la proponita persona aŭtonomio, bazita sur kolektivaj rajtoj, de la hungaroj vivantaj ĉi tie, sur la rekono de la subjekteco de publikaj rajtoj, estos apogata flanke de la leĝodona instanco.

KOMUNUMOJ KUN SPECIALA STATUSO

Ĝeneralaj dispozicioj

paragrafo 1.

Akorde kun la principoj el la baza dokumento de UN, kun la ĝenerala deklaro pri homaj rajtoj, kun la internacia kontrakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj kaj kun la internacia konvencio pri ekonomiaj kaj sociaj kaj kulturaj rajtoj,

kun la findokumentoj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kun la Pariza dokumento pri Nova Eŭropo kaj kun la aliaj dokumentoj de KSKE traktantaj la homajn kaj minoritatajn rajtojn,

kun la internacia konvencio celanta eksigi la rasan diskriminacion, kun la konvencio por preventi kaj puni genocidon,

kun la principoj el la rezulocio de la Haga/Brusela Jugoslavio-konferenco kaj kun la ebloj certigi specialan jurstaton, difinitan en la punkto c. de la dua parto de la dokumento prezentita de lordo Carrington, la prezidanto de la konferenco,

akcentante, ke komuna celo de la ĉi tie vivantaj popolgrupoj estas starigi demokratian socian sistemon, kiu en la kadroj de jurŝtato certigas por ĉiu civitano plene apliki la homajn rajtojn, la fundamentajn rajtojn al libereco kaj la minoritatajn (etnajn) kolektivajn rajtojn, libere esprimi la laŭleĝajn interesojn, aspirojn, inkluzive la protekton de la teritoria aŭtonomio:

la leĝodona ĉambro de Respubliko Serbio, resone al eksplicite esprimata volo de la hungara etno vivanta ĉi tie, taskigas sin establi al la komunumoj kaj teritorioj kun hungara plimulto specialan statuson.

Komunumoj kun speciala statuso

paragrafo 2.

Tiuj komunumoj – teritorioj – kie la hungara loĝantaro faras simplan plimulton, ĝuas teritorian memdecidan rajton (aŭtonomion) kaj posedas specialan statuson.

paragrafo 3.

La membrojn de la komunumaj deputitaroj en la komunumoj kun speciala statuso – posedantaj apartan statuson – kaj ties plenumkomitatojn oni elektas, respektive nomumas laŭ la nacia strukturo de la loĝantaro. La sama principo estas sekvena por elekti la oficistojn de la ŝtataj institucioj kaj de la publikaj entreprenoj.

paragrafo 4.

La decidoj kaj preskriboj de la forumoj kaj organoj de la komunumoj kun speciala statuso garantias, konforme al la leĝoj, egalrajtecon de la serboj, kroatoj, slovakoj, rutenoj, rumanoj kaj aliaj etnoj, kiuj vivas sur la teritorioj de tiuj komunumoj.

paragrafo 5.

La serboj kaj la aliaj etnoj, vivantaj en komunumoj kun speciala statuso, havas la samajn rajtojn kaj deojn, kiujn la hungaroj vivantaj tie en plimulto, krome ili posedas apartajn rajtojn kaj deojn, preskribitajn per ĉi tiu dokumento.

paragrafo 6.

La komunumoj kun speciala statuso memstare decidas pri la subaj problemoj (apartenantaj al primara kompetenteco de la komunumoj):

- pri evoligo teritoria kaj urbanisma,
- pri ekonomia evoluigo,

- pri la kontentigo de komunaj bezonoj de la loĝ antaro: konstrui kaj funkciigi komunajn servojn, la instituciojn,
- pri natur- kaj medioprotekto,
- pri evoligo de la kultura vivo: fondo kaj funkciigo de muzeoj, bibliotekoj, teatroj ktp.,
- pri plenumado de la sanprotektaj kaj sociaj bezonoj,
- pri la klerigaj kaj edukaj institucioj,
- pri la apliko de la civitanaj kaj etnaj rajtoj,
- pri garnatio de la publika ordi, sendanĝ ereco en la trafiko,
- pri fondiĝ o de diversaj organizaĵoj kaj servoj.

Organoj de la komunumoj kun speciala statuso

paragrafo 7.

La organoj de la komunumoj kun speciala statuso:

- komunuma deputitaro,
- komunuma plenumkomitato,
- komunuma tribunalo,
- komunuma policestra ofico.

paragrafo 8.

La taskojn kaj kompetencojn de la organoj en la komunumoj kun speciala statuso, la proceduron ĉe ilia elekto, la labormetodon preskribas la komunumo en sia statuto, konforme al la leĝoj pri la teritoria aŭtonomio kaj pri la balotoj.

Ceteraj dispozicioj

paragrafo 9.

La movaj rimedoj kaj la senmovaĵoj troveblaj sur la teritoriede komunumo kun speciala statuso, formantaj komunan havaĵon, same la rajtoj ligitaj al ili, estas komunuma posedaĵo.

paragrafo 10.

La enspezojn kaj elspezojn de la komunumo kun speciala statuso difinas la jara buĝeto.

Profitfontoj de la komunumoj:

1. el la moveblaj kaj nmoveblaj posedaĵoj,
2. profitoj el entreprenoj, institucioj, agentejoj kaj aliaj organizaĵoj en ilia posedaĵo,
3. enspezoj el komunumaj impostoj kaj depagoj, konforme al la leĝo,
4. el donacoj, heredaĵoj, fondaĵoj,
5. aparte planitaj rimedoj el la ŝtata buĝeto, aŭ per leĝoj planitaj helpoj, donacoj kaj
6. aliaj enspezoj difinitaj per leĝoj.

paragrafo 11.

La laŭleĝeco de la financa agado de la komunumo kun speciala statuso estas sub la kontrolo de la organo rajtigita per ŝtata leĝo.

paragrafo 12.

Respubliko Serbio subskribas internacian konvencion por kontroli la efektiviĝon de la leĝo pri la komunumoj kun speciala statuso.

KONVENCIO PRI INTEGRIĜO DE LA KOMUNUMOJ KUN SPECIALA STATUSO

HUNGARA AŬTONOMA DISTRIKTO

Generalaj dispozicioj

paragrafo 1.

La najbaraj komunumoj kun speciala statuso kaj hungara plimulto por pli efike plenumi sian agadon el primara kompetenteco, krome por protekti la nacian identecon de la hungara etno, validigi la sociajn kaj kulturajn rajtojn unuigas en asocion.

paragrafo 2.

Pri la aliĝo decidas la komunumaj deputitaroj elektitaj per la unua libera plurpartia loka balotado. Se la komunuma deputitaro ne deklaras opinion pri la afero, aŭ se la civitanoj malkontentas pri ĝia decido, 100 civitanoj rajtas proponi plebisciton. La subskribo de 1 000 civitanoj devigas okazigi plebisciton.

paragrafo 3.

La konvencio pri kunagado ebligas liberan aliĝon al la hungara distrikto por vilaĝoj kun hungara plimulto ankaŭ el la najbaraj komunumoj, respektive apartiĝon de vilaĝoj kun serba plimulto en la kazoj, se ili situas ĉe la rando de la distrikto.

paragrafo 4.

La nomo de la administra kaj registara unuo, formita per integriĝo estas: Hungara Aŭtonoma Distrikto.

paragrafo 5.

Gvidate de klopodo, ke la hungara teritoria aŭtonomio havu decan rezidejon, la konvencio destinas por administra centro de la Hungara Aŭtonoma Distrikto la urbon Szabadka (Subotica).

paragrafo 6.

La kompetenco de la aŭtonomio

La Hungara Aŭtonoma Distrikto kompetentas en ĉiuj aferoj kaj ĉiuj formoj de direktado, kiuj pro la specifaj cirkonstancoj de la teritorio kaj popolo, postulas specialan direktadon, kaj kiujn preskribas la koncernantaj internaciaj konvencioj.

paragrafo 7.

La Hungara Aŭtonoma Distrikto en sia kompetenteco zorgas precipe:

- a) pri religiaj kaj klerigaj aferoj, pri direktado de ekonomiaj kaj sociaj agadkampoj,
- b) sanoprotekto,
- c) informado,
- d) jurisdikcio, polico – laŭ la dispozicioj de apartaj leĝoj,
- e) pri la difino de financaj elspezoj kun ties kovro,
- f) pri lokaj registaraj taskoj, kiuj laŭ la leĝoj pri la aŭtonomio kaj laŭ aliaj leĝoj apartenas sub la kompetenteco de la aŭtonomio.

paragrafo 8.

En la Hungara Aŭtonoma Distrikto estas egalrajtaj oficialaj lingvoj la hungara, serba kaj kroata. En la hungara aŭtonomio ĉe ĉiuj magistratoj, oficoj, lernejoj kaj situacioj devas esti enpostenigitaj personoj, kiuj konas kaj la hungaran kaj la serban, respektive la kroatan lingvojn.

paragrafo 9.

Tiuj civitanoj, kies gepatra lingvo ne estas la hungara, serba aŭ kroata, en la Hungara Aŭtonomia Distrikto ĝuas la samajn rajtojn, kiujn la leĝoj kaj aliaj reguloj donas al la naciaj minoritatoj en la tuta lando.

paragrafo 10.

La blazonon de la Hungara Aŭtonoma Distrikto aprobas la Asembleo. La standardo estas tri kolora: ruĝa-blanka-verda sen blazono kaj sen stelo. La blazonon kaj standardon de la Hungara Aŭtonoma Distrikto oni uzas oficiale apud la standardo, respektive apud la blazono de la ŝtato.

La organoj de la Hungara Aŭtonoma Distrikto

paragrafo 11.

La organoj de la Hungara Aŭtonoma Distrikto estas:

- a) la Asembleo,
- b) Distrikta Konsilantaro,
- c) la prezidanto.

paragrafo 12.

La ĉefa organo de la Hungara Aŭtonoma Distrikto estas la Asembleo. Ĝiaj membroj elektiĝas per balotoj por 4 jaroj.

paragrafo 13.

La Asembleo:

- a) akceptas la statuton,
- b) el siaj vicoj elektas Distriktan Konsilantaron,
- c) elektas la prezidanton el siaj vicoj,
- d) nomumas, respektive elektas membrojn de la administraj komisionoj de la Hungara Aŭtonoma Distrikto la prokuroron, financan direktoron, konsilanton por eduko, la poliestron kaj la aliajn funkciulojn,

- e) decidas pri la buĝeto kaj finkalkulo de la aŭtonomio,
- f) kontrolas la administradon en sia kompetenteco, kaj sub registara direktado kaj raportas al la ĉefministro per la gubernatoro,
- g) decidas pri ĉiuj demandoj difinitaj per leĝo kaj per ministra dekreto, aŭ pri kio la statuto taskigas ĝin.

paragrafo 14.

La Asembleo de la Hungara Aŭtonoma Distrikto aprobas statuton en sia kompetenteco.

La statuto de la Hungara Aŭtonoma Distrikto difinas:

- a) la elektomanieron por la organoj de la hungara aŭtonomio,
- b) la metodojn kunvoki kaj funkciigi la Asembleon, terminojn de la regulaj kunvenoj kaj laborordon,
- c) regulojn por deklari kaj diskonigi la statuton, la regularojn kaj ilian validigon,
- d) organizon de la ofico gvidata de la prezidanto,
- e) detalajn regulojn pri apliko de lingvoj en la administrado,
- f) la blazonon kaj standardon de la Hungara Aŭtonoma Distrikto ne povas kolizii kun la koncerna konstitucio kaj la komunumaj reguloj devas harmonii kun la statuto de la Aŭtonomio.

paragrafo 15.

La Distrikta Konsilantaro:

- pretigas statutproponon por la teritoria aŭtonomio kaj prezentas ĝin al la Asembleo,
- prezentas proponojn al la Asembleo el la kompetenteco de la memregado kaj plenumas decidojn de la Asembleo,
- kontrolas la laboron de la aŭtonomio,
- aranĝas la aferojn, kiuj laŭ la leĝoj aŭ statute apartenas al ĝia kompetenteco.

paragrafo 16.

La prezidanto:

- zorgas pri la efektivigo de la leĝoj, ediktoj, de la statuto, de la regularoj de la aŭtonomio kaj de la registaraj instancoj, de la decidoj kaj disponoj de la aŭtonomio,

- nomumas la oficistojn, kiuj ne estas elektendaj,

- zorgas pri la taskoj, kiujn la leĝo, ministra dekreto kaj la statuto metas en lian kompetentecon,

- reprezentas la interesojn de la Hungara Aŭtonoma Distrikto.

Antaŭ enoficiĝo la prezidanto ĵuras en la Asembleo. Aŭtonoma Distrikto kovrendas de la civitanoj, vivantaj sur ĝia teritorio, el subvencoj kaj monhelpoj fiksitaj en la ŝtata buĝeto.

paragrafo 18.

La salajroj de la postenitaj oficistoj en la ŝtata administrado estas kovrendaj el la distrikta buĝeto, simile al ties de la komunumaj.

paragrafo 19.

La elspezoj de la justicaj organoj kaj de la komunumaj aŭtonomioj estas kovrendaj per la enspezoj fiksitaj en la leĝoj kaj aliaj jurreguloj kaj el helpoj.

ARGUMENTOJ

al la propono por la hungara teritoria aŭtonomio

Konsentante la proponojn de lordo Carrington, la prezidanto de la Jugoslavio-konferenco en Hago, respektive en Bruselo pri la reguligo de la statuso de naciaj minoritatoj, la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino pridiskutis la punkton c. en la dua parto de la menciita dokumento, la eblojn, laŭ kiuj estus garantiata la tie difinita jurstato por la komunumoj, kie la hungara etno estas en plimulto.

Sur la bazo de niaj pritraktoj la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino kiel la sola legitima, vaste apogata interesdefenda organizaĵo de la hungaroj ĉi tie vivantaj, prezentas la proponon al la parlamento de Respubliko Serbio apelaciante, ke la leĝodonanta kolegio garantiu specialan statuson al la hungarplimultaj komunumoj (teritorioj) kun propra leĝodono, propra polico, kun propra institucia sistemo kaj libera uzo de la naciaj simboloj.

La propono ebligas al la Vojvodinaj komunumoj kun hungara plimulto, same al la vilaĝoj, liberan asociiĝon al la Hungara Aŭtonoma Distrikto kaj ilian apartiĝon el ĝi. Pri la asociiĝo, pri la aliĝo al la Hungara Aŭtonoma Distrikto la civitanoj decidas post la unuaj plurpartiaj liberaj ĝeneralaj balotadoj por la lokaj magistratoj, per la elektitaj novaj komunumaj deputitaroj.

La hungara etna bloko apud la rivero Tibisko: la komunumoj Kanizsa (Kanjiža), Zenta (Senta), Ada, Csóka (Čoka), Óbecse (Stari Bečej), respektive en la centra regiono de Bačka Kishegyes (Mali Idjoš), Topolya (Bačka Topola) kaj Szabadka (Subotica) kun kelkaj najbaraj komunumoj formas ĉirkaŭitan teritorion, kie en granda plimulto kaj en relative ferma masivo vivas la hungara etno.

Krom la etna, ĉi tiu regiono havas homogenajn naturajn, kulturajn, ekonomiajn karakterizojn. Tiu ĉi regiono ĉe la fondiĝo de novaj administraj unuoj en la Respubliko Serbio laŭ ĉiu racia logiko restus mem-

kompreneble nedispartigita tuto, sed malgraŭ tio la kompetentuloj preterlasis tiun normalan solvon, evidente aliaj interesoj direktis ilian agon.

La regionigo, kiu la vojvodinan hungaran etnon disrompis al sep partoj, evidente ne estas akceptebla al ni. Tio ja rezultus kulturen kaj ekonomian pereon de la hungara etno. Per establo de la hungara teritoria aŭtonomio ni klopodas plibonigi nian malfavoran situacion, kaŭzitan per nia nombra malplimulteco; por ke kiel samrajta elemento, ĝuante egalajn rajtojn kaj eblojn, kiajn havas la aliaj popoloj, ni konservu niajn naciajn karakterojn. Ni ne postulas pli ol tiu, kion rajtas havi la serba etno en Kroatio, aŭ en la aliaj sendependiĝintaj landoj.

Serbio ne povas apliki diskriminaciajn normojn. Ĝi ne povas rifuzi la normigon de la nova laŭleĝa konstitucia statuso de la naciaj minoritatoj (etnoj), garantion de la memadministrataj formoj, kiuj kongruas kun la litoj kaj kun spirito de la pacprojekto.

Malfavora diskriminacio de la naciaj minoritatoj (etnogrupoj), kio nin premas dum sepdek iom da jaroj, la diskriminaciaj normoj, kio ankaŭ hodiaŭ trafas nin, ĉio tio havas siajn radikojn en la malmalmodernaj justiciformoj, kiujn la Eŭropa Komunumo kaj la tuta civilizita mondo ne konas. Ĝi ne konas kaj ne akceptas tion. Tiugrade, ke al tiuj landoj, kiuj ne estimas la regulojn pri la rajtoj de la naciminoritatoj (etnoj), kiuj landoj diskriminacias ilin malfavore, hodiaŭ la okcidentaj landoj rifuzas ilian aliĝon al la Eŭropa Komunumo. Ni kredas, ke en la estonto daŭre tiel estos.

La prezentita propono pri la teritoria aŭtonomio ne enhavas kaj ne detaligas la internajn aferojn de la aŭtonomio, pri diversaj branĉoj de la ŝtata administrado. Ĝi tiu propono entenas la esprimon de la principo al certagrade aŭtonomio por la konturita teritorio, por la Hungara Aŭtonoma Distrikto, respektive la fiksado de la kadroj de tiu aŭtonomio, de ĝiaj aŭtonomiaj administrataj instancoj kaj de ilia kompetenteco.

Konvinkite, ke la hungaroj, kiuj vivas en la Respubliko Serbio kapablas plenigi la kadrojn kaj la eblojn akirotajn per la aŭtonomio, ni petas la ŝtatan leĝodonan kolektivon aprobi ĉion tion kaj establi per leĝo la teritorian aŭtonomion laŭ ĉi tiu propono.

PROPONO

por establi hungarajn lokajn aŭtonomiojn

Por la pli perfekta afirmiĝo de la fundamentaj homaj kaj minoritataj rajtoj

deirante de la dispozicioj de la Eŭropa Ĉarto, laŭ kiu la lokaj magistratoj apartenas al la fundamentaj kolonoj de la demokratia regado,

konvinkite pri tio, ke nur lokaj magistratoj, posedantaj veran respondecon, la aŭtonomioj garantias efikan administradon paralele kun la rajtoj de la naciaj minoritatoj (etnoj) al ties libereco,

konsiderante, ke la lingvo, kulturo, la historiaj tradicioj de la naciaj minoritatoj (etnoj) estas valoroj, kies konservado kaj evoluigo ne estas nur rajto de la minoritata, sed ankaŭ intereso de la majoritata nacio, krome

konvinkite, ke la minoritata statuso – precipe de la sporade vivantaj kaj lingve izolitaj etnogrupoj – fontanta el la malfavora situacio, estas solvenda per efiksaj kontribuoj kaj de la ŝtato kaj de la socio,

konforme kun la ĉi supraj celoj, kun la preskriboj de la koncernantaj internaciaj konvencioj, precipe kun la apelacioj de la konferenco pri Jugoslavio, konkrete kun la prezentita reguliga propono, en la punkto 2.3 donita de lordo Carrington pri la eblaj formoj de aŭtonomio, la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino per sia konferenco prezentas proponon por establi lokan aŭtonomion de la hungara nacia minoritato vivanta en izolitaj vilaĝoj kiel plimulto.

Ĝeneralaj reguloj

paragrafo 1.

La naciminoritataj (etnaj) rajtoj estas fundamentaj rajtoj de libereco, kiuj apartenas al ĉiuj. Respubliko Serbio agnoskas tion kaj garantias ties

neĝenindan praktikadon. Sur la bazo de tiuj ĉi rajtoj ĉiuj rajtas libere esprimi kaj konfesi sian apartenon al nacia komunumo, etna grupo, flegi sian lingvon, siajn kulturojn kaj tradiciojn, kulti sian religion, uzi sian gepatran lingvon kaj skribe kaj buŝe.

paragrafo 2.

Hungaroj vivantaj sporade en opaj kolonioj, kie la membroj de la hungara etna grupo loĝas en simpla plimulto, establas hungaran lokan aŭtonomion.

La kompetenteco de la loka aŭtonomio

paragrafo 3.

La kompetentecon de la lokaj magistratoj difinas la konstitucio kaj la leĝoj. Al la vilaĝoj kun hungara plimulto la leĝoj kaj dekretoj devas ebligi mandatigon per kompetenteco kaj devoj – laŭ specialaj celadoj – atentante pri la lingvaj kaj kulturaj interesoj de la hungaroj.

La lokaj magistratoj en la kadroj de la leĝoj disponas komplete pri ĉiuj tiaj demandoj, kiuj apartenas al ilia kompetenteco.

La kompetenteco de la lokaj magistratoj komforme al la leĝoj estas plena kaj ekskluziva. Tion povas limigi alia teritoria – komunuma, regiona – organo nur surbaze de konkretaj preskriboj de juraj normoj.

Protekto de la limoj de la teritorio en la loka aŭtonomio

paragrafo 4.

La limoj de la loka aŭtonomio ne estas ŝanĝeblaj sen plebiscito okazigita sur la koncerna teritorio.

Estrantaj organoj de la loka aŭtonomio

paragrafo 5.

La loka aŭtonomio – ne ofendante la leĝajn preskribojn – konforme al la lokaj bezonoj, kaj por garantii la efikecon, mem difinas la internan strukturon de la administrado.

Kontrolo de la lokaj aŭtonomioj

paragrafo 6.

Kontrolo super la funkciado de la lokaj aŭtonomioj eblas nur en la okazoj kaj inter la kadroj preskribitaj en la konstitucio kaj per la leĝoj.

La kontrolo de la agado de la organoj de la lokaj aŭtonomioj ĝenerale celas nur revizion pri la konformeco de ties agado al la konstituciaj principoj kaj al la leĝoj.

La superaj registaraj organoj rajtas praktiki administran kontrolon super la organoj de la lokaj aŭtonomioj nur pri tiuj taskoj, kies plenumo kompetentas la lokaj estraroj.

Financado de la lokaj aŭtonomioj

paragrafo 7.

En la kadroj de la ekonomia politiko la organoj de la lokaj aŭtonomioj rajtas havi proprajn konvenajn financajn fontojn uzeblajn libere en la praktikado de sia kompetenteco.

La lokaj estraroj akiras parton de siaj monfontoj el la lokaj impostoj kaj taskoj, kies sumon povas fiksi la aŭtonomio inter laŭleĝe reguligitaj kadroj.

La finance malfortaj aŭtonomioj povas esti subvenciataj el ŝtataj aŭ aliaj financaj fontoj, por mildigi siajn financajn malfacilaĵojn.

Asociiĝo de la lokaj administraj organoj

Paragrafo 8.

La lokaj administraj organoj rajtas kunlabori kaj asociiĝi kun la aliaj lokaj administraj organoj dem la efektivigo de siaj celadoj kaj taskoj por plenumi siajn taskojn en komuna intereso.

La ŝtato devas agnoski la rajton de la memdirektaj organoj por aliĝi al naciaj ligoj kun la celo defendi kaj helpi sciajn komunajn interesojn.

La lokaj memdirektaj, memadministraj organoj povas ligi kontraktojn kaj povas kunlabori kun lokaj memdirektaj kaj memregistaj organoj en aliaj ŝtatoj.

ARGUMENTOJ

al la propono por la hungaraj lokaj aŭtonomioj

Konsiderante la cirkonstancon, ke sur la teritorio de Vojvodino ekzistas preskaŭ dekkvin tiaj komunumoj, en kiuj la hungara etna plimulto vivas en insulo (vilaĝgrupo), akorde al la Eŭropa Ĉarto pri loka aŭtonomio kaj al la principoj de la reguliga propono de lordo Carrington, al la preskriboj de ties punkto 2.3, prezentita antaŭ la Jugoslavio-konferenco en Hago, la Demokratia Asocio de Hungaroj en Vojvodino, elpaŝas por establi hungarajn lokajn aŭtonomiojn.

Ni opinias, ke la solvo de la naciminoritata (etna) problemo estas primara por akiri daŭran pacon kaj solvi la etnajn konfliktojn. Tiuj problemoj estas solvendaj laŭ egalaj principoj kaj normoj. Estas neakceptebla, ke la speciala statuso de aŭtonomio ne estu rajto de ĉiu nacia minoritato egale tie, kie ĝi vivas en loka plimulto, t. n., ke iu ajn popolo aŭ etnogrupo akiru privilegiojn kontraŭ la aliaj popoloj aŭ etnogrupoj.

La dokumento de Hago – kiu fakte egalrajtigas la naciajn minoritatojn kun la majoritata popolo kaj garantias al ili la bezonatajn kolektivajn rajtojn kaj diversajn memdirektajn formojn por konservi sian identecon – proponas taŭgan bazon ankaŭ al la hungaroj en Vojvodino por aranĝi sian nesolvitan situacion.

La demokratia solvo de la situacio de la ĉi tie aŭtoktone vivanta hungara minoritato en la spirito de la dokumentoj de Hago – garantianta la menciitajn aŭtonomajn rajtojn – reprezentas progreson en la solvo de la antagonismoj kaj streĉoj en ĉi tiu geopolitika regiono por estigi kondiĉojn al paca kunvivado kaj al la procezo de nova Eŭropa arango.